

PUBLIC LIBRARY
31 MAY 1922
VICTORIA

La Suda Kruc

Oficiala Organo de la Aŭstralazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 23.

Melburno (*Melbourne*), Aŭstralio.

10 Majo, 1922.

American Diplomatist says, "A World Tongue a Crying Need."

Colonel House, a member of the American Peace Delegation to Versailles, says there must be an international language for use in diplomacy and commerce. In an interview reported in the "Public Ledger," he said:

"There are few things more necessary to a better understanding between nations than a universal language to be used in commerce and diplomacy. . . .

"Everyone familiar with the Versailles Conference knows how much Orlando, the Italian prime minister, was handicapped because of his inability to communicate with his English and American colleagues except through an interpreter.

"At Washington it is the French who have suffered. There was no one among the heads of their delegation who could speak English except the genial and scholarly Jusserand. What they lost in prestige because of this is a matter for speculation, but that it was great no one at the conference will deny.

"... these two conferences have been successful, so far as the machinery of language is concerned, by chance."

Not only international conferences, said Colonel House, but also commerce, science, and literature, and, in fact, the peoples of the world need the common tongue. The world has a choice between Esperanto and mediaeval Latin.

The "Amerika Esperantisto," from which this report is taken, says: "Ancient Latin was so difficult that its own people abandoned it, mediaeval Latin was so difficult that the lay world definitely threw it overboard, and Esperanto is so easy that the many will and can and are learning it, while Latin of any sort is but a ghost of the drear past to which there is no return. Forward, not back!"

Here and There.

Jewish residents of Philadelphia have formed a club for the study of Esperanto.

The Llano co-operative colony, Leesville, Louisiana, teaches Esperanto to children in the High School course. The aim of this group of co-operators is to use Esperanto in their everyday life.

The New York Bakers' Union, consisting of 4000 members, has taken most enthusiastically to Esperanto. Three teachers hold classes every evening.

Esperantista Vivo en Omsk.

Post la renverso en januaro 1920 estis al la klubo donita ejo en la lernejo, la registaro donacis ankaŭ la meblaron kaj fortepianon. Ni havas nun 4 pagatajn oficistojn (la gvidanton de la mastrumado, administranton, skribmaŝiniston kaj bibliotekiston), sed ni rajtas havi ĝis 8 oficistojn. La prezidanto rifuzis la akcepton de la salajro. La oficado daŭras ĉiutage de la 5a ĝis 10a horo, membraj kunvenoj okazas ankaŭ ĉiutage. Nuntempe funkcias 8 kursoj, la instruistoj ricevas por 1 horo 70 rublojn. La registaro donas regule al la klubo blankan panon, buteron, fromaĝon, kolbason, sukeron kaj teon. Ĝus forveturis en Nederlandon unu kursanino. Ŝi donacis al la klubo sian pianon. Tiamaniere ni nun posedas du pianojn.

En parko sur la strato Atamanskaja ni aranĝis grandan propagandan koncerton kaj publikan paroladon. Eniro estis senpaga, sur la anguloj ĉirkaŭ la parko pendis ruslingvaj kaj esperantaj proklamiloj pri Esperanto kaj verdaj standardoj. Al la sidanta publiko oni dispruntedonadis flugfoliojn kaj librojn por tralego. De la sepa horo matene ludis la orkestro, aŭdiĝis ankaŭ nia esperanta himno. Je la 9a horo antaŭtagmeze, kiam la parko estis plene, komencis la paroladoj. Parolis ruse Novoselĵov, Maleckij, esperante Najdin. Post la parolado anoncis sin 400 personoj en Esperantajn kursojn. La instruistoj de la lokaj lernejoj devige lernas Esperanton.

(El tiro el letero de samideano el Omsk, el "La Progreso").

Activity in Belgium.

A number of students at the Upper Commercial Institute, Antwerp, are learning Esperanto. At Bruges a new course has been commenced with 125 members. In Verviers Esperanto classes are conducted by the local Red Cross society, by office workers (1800), and by the woollen workers' trades union. The city council has approved of the optional instruction of Esperanto in the fourth grade of the schools for boys. The president of the Verviers group will give a prize of 100 francs to enable the boy making the most progress to visit the next Belgian Esperanto Congress.

Brazilia Ligo Esperantista kaj Brazilia Registaro.

La lan de decembro de 1920 deputitoj s-roj E. Mesquita kaj Lima prezentis projekton de leĝo, kiu Brazilia Ligo Esperantista estus konsiderata societo de publika utileco.

D-ro Leoni Ramos favore raportis tiun ĉi projekton, kiu estas en januaro 1921a aprobita de la Deputita Ĉambro kaj sendita al la Senato.

Senatano d-ro Godofredo Vianca finis sian bonegan raporton per jenaj vortoj: — Tiu sufiĉas por ke Senato povu rekoni la utilecon kaj efikan, kiun la Ligo alportos al altaj naciaj interesoj.

Tiu ĉi raporto estas unuanime aprobita de la Leĝa kaj Justeca Komitato kaj la projekto poste de la Senato.

La rezolucio de la Parlamento estis tiam sendita al d-ro Epitacio Pessoa, prezidanto de la Respubliko, kiu sankciis la 26an de oktobro lasta per la dekreto n. 4356.

Je la 12a de novembro d-ro Epitacio Pessoa ricevis la antaŭe promesitan viziton de komitato konsistanta el s-roj A. Couto, Fernando, prezidanto de Brazilia Ligo Esperantista; d-ro Nuno Baena, prezidanto de Brazilia Klubo "Esperanto"; s-ro A. C. de Arruda Beltrao, prezidinto de la Organiza Komitato de la 6a Brazilia Kongreso de Esperanto, kiu lin dankis pro la sankcio de la Parlamento rezolucio, laŭ kiu Brazilia Ligo Esperantista estas konsiderata kiel societo de publika utileco.

Lia Prezidanta Moŝto diris ke li ĉi sankciis tute plezure, ĉar li estas konvinkita ke la internacia lingvo Esperanto estos tre utila al la Homaro dank' al ĝia logiko kaj facileco, kiujn li mem konstatis per legado de esperanta gramatiko.

Li promesis sian helpon al la propagando de Esperanto kaj precipe al ĝia instruado en publikaj lernejoj.

La komitato donacis al d-ro Epitacio Pessoa kelke da esperantaj libroj, pro kiuj li dankis ilin, promesante ellerni la helpan lingvon, tiel kiam li havos disponeblan tempon.

La ĵurnaloj priparolis pri tiu vizito kiu certe plirapidigos la propagandon de Esperanto en Brazilio.

(Brazilia Esperantisto)

Libertempo.

Kiam alvenas la difinita dato por ĝia apero kaj la ĵurnalo mem ankoraŭ ne estas preta, eble la legantoj de la "Suda Kruc" malpacienĉigas. La redaktoro tiutempe absolute frenezias. Li skribas al la presisto, li telefonas al la presisto, fine ĉiun tagon li iras al la presejo, iufoje kun plendoj, iufoje kun petoj. La presisto ĉiam estas afabla kaj ĉiam promesas ke la ĵurnalo estos preta "morgaŭ." Tamen "morgaŭ" venas, sed ne la "Suda Kruc," kaj spite de la petegoj, kiuj fariĝas mallaŭdoj kaj eĉ riproĉoj, la kompleza presisto iras sian vojon kaj kiam oportuna al li kaj ne antaŭe, tiam la "Suda Kruc" ricevas lian atenton kaj la Esperantistoj disigitaj tra tuta Aŭstralazio povas legi novan ekzempleron de ilia (ĉu oni povas ĝin diri) plej ŝatata ĵurnalo. Sed antaŭ monato, meze de la kutimaj malfruecoj, la redaktoro ne skribis, ne telefonis, nek vizitis, nek iamaniere ĝenis la presiston. Li restis trankvila, kaj, kvankam li ne forgesis la ĵurnalon, li pro ĝi tute ne travivis sendormajn noktojn. Kial? Ĉar tiutempe li pasigis tre agrablan libertempon sur insulo Phillip. Kvankam la insulo estas atingebla post tri-kvar hora veterado el Melbourne kaj kvankam ĝi estas plena de tre interesaj kaj vizitindaj lokoj ĝi estas la Cindrulino de niaj apudmaraj restlokoj. Post duhora irado per vagonaro kiu trapasas la multajn urbetojn, kiuj lokiĝas sur la rando de golfo Port Phillip, oni elvagoniĝas ĉe Stony Point, (Ŝtona ekstremaĵo), kaj ekrigardas super la akvojn de Westernport Bay, (Okcidenta Haveno). Ĉi tie la vaporŝipeto "Genista" atendas preta por la mallonga marveturo ĝis Cowes, la ĉefurbo de insulo Phillip, kie la plimulto de la vojaĝantoj elŝipiĝas dum la ceteraj iras al aliaj lokoj vizitotaj de la ŝipo antaŭ ol ĝi atingos sian celon —San Remo, malgrandan, marbordan lokon sur la ĉeftero de Aŭstralio mem.

La insulo Phillip estas trovita de la Angla esploristo, Bass, en la jaro 1798. Ĝi preskaŭ fermas la eniron al la golfo Westernport, en kiu estas la insulo Franca, multe pli granda ol Phillip. Alia insulo, nur malgranda, estas insulo Churchill; kie en la jaro 1801 la unua tritiko kulturita en Vik-

torio estas semita. Insulo Phillip havas proksimume dudek unu mejlojn da longo kaj sep mejlojn da vasto. Cowes sidas sur nealtaj montetoj ĉe la enlanda, ŝirmata flanko de la insulo. Krom la poŝtoŭicejo kaj kelke de provizejoj ĝi konsistas ĉefe el domoj por la logado de vizitantoj. Ĉi tie la sabla marbordo estas tre alloga. Oni povas trankvile sidi en ombro de arboj, ĝui tason da teo en apuda konkornamita tedomo, aŭ plaŭdi kaj naĝi ĝis sato en la pacaj akvoj de la golfo. Tre plezuriga ekskurso estas la marveturo per motorboato al la okcidenta ekstremaĵo de la insulo, kie oni vidas la lumturon sur promontoro. Sur apudaj rokoj kaj en la maro svarmas fokoj. Estas dirite, ke ok mil hejmiĝas tie. Eble oni iom troiĝas, sed ili estas sufiĉe abundaj, kaj pro tio ke la registaro malpermesas la ĉasadon, ili amuzos sin kaj la vizitantojn en multaj venontaj jaroj. Sur la alia ekstremaĵo de la insulo, kontraŭ San Remo, estas terkapo Woolamai, la plej alta loko sur la insulo. De la supro oni povas rigardi malproksimen super la markolo Bass. La bazo de Woolamai estas granito. El ŝtono deveninta de tie oni konstruis iujn de la imponaj, grandegaj oficejoj de Melbourne. Miloj da marbirdoj, kiujn la insulanoj nomas Mutton Birds, (Ŝafajaj birdoj), ĉiujare venas el la suda maro kaj demetas siajn ovojn en truoj, kiujn ili fosas en la sabla tero de la flankoj kaj supro de Woolamai. Pli ol cent miloj da ovoj estas kolektataj ĉiusezone. Kiam la junaj birdoj forlasas la nestojn miloj el ili estas kaptataj. Oni salas kaj en fumejo sekigas kaj fine vendas ilin por manĝado. Inter la Fokaj Roko kaj Woolamai la marbordo ricevas fortajn ventobatojn el la sudo kaj la ĉiame knaranta maro ĉizis multajn pentrindajn formatojn tiajn kiaj estas Piramida Roko, Forrest Kavaĵo kaj la Blow Hole, (Siblanta truo).

La tero kaj klimato estas tre taŭgaj por la cikorio, kaj ĉiujare granda kvanto estas kreskigita. Estas pensate, ke la tabaka planto ankaŭ ĉi tie bone kreskus kaj post nelonge provo estos farata.

Alkutimiĝinte al la vagado sur la sablaj marbordoj, al la boataj ekskursoj, al grimpado sur la

ventovipitaj altaĵoj la vizitanto forlasas ĉi tiun ĉarman insulon kun vera bedaŭro kaj kun espero, ke venos frue la tempo kiam ĝiaj plezuroj estos denove ĝuataj.

La du Vilag'anoj kaj la Nubo.

Du vilaĝanoj vidis nubon sur la ĉielo.

— Ĝi alportos fulmotondron, diris la unua.

— Ne, pluvos, diris la alia.

— Mi diras, ke tiu nubo alportos teruran fulmotondron, kiu detruos niajn rikoltojn kaj fruktojn. Nia edzino, niaj gefiloj, niaj ĉevaloj, bovoj, porkoj, ŝafoj, kokinoj, kolomboj, anseroj, kaj ni mem ne havos nutraĵon. Estos la malsatego, la malsanoj, la morto!

— Vi eraras, mia amiko, la falonta pluvo faros multajn bonaĵojn al niaj kampoj. La tero donos la duoblon da aveno, hordeo, sekalo, tritiko kaj vinberoj.

— Ne!

— Jes!

La parolado varmegigis, ŝanĝigis en disputon kaj la du vilaĝanoj ekbatalis. Dum tiu tempo la vento kunportis la nubon al alia lando. Ne pluvigis, nek fulmotondris tiun tagon.

Ne perdu vian multekostan tempon per necesaj paroladoj, sed uzu ĝin por plenumi viajn devoj.

(Laŭ la Franca Fablisto Florian. Tradukis Germaine Kenens. El "Belga Esperantisto").

Gazetoj Ricevitaj.

Amerika Esperantisto, feb.; Belga Esperantisto, jan.-feb.; Bulgara Esperantisto, jan.; Bizantio, dec.; Bulteno, F.S.P.E., mar.; Brazilo Vivo, Rua General Sampaio 330, Fortaleza, Ceara, duonmonate, jan.; Esperantista Junularo, feb.-mar.; France-Esperanto, feb., mar.; Hungara Esperantisto, jan., feb.; Katolika Mondo, n-ro 7; Katolika Revuo, Nyiresaszari, Dep. Szatmar, Hungarujo, jan.; L' Esperanto, feb.; Le Monde Esperantiste, jan.-feb.; Litova Stelo, eldonata de Litova Esperanto-Asocio, Kaunas, monate, 48 jare, jan.; Nova Tempo, feb.; Progreso, mar.; Revuo Orienta, jan., feb.; Senacieca Revuo, mar.; La Semisto, dec.-feb.; Verda Utopio, feb.

La Rivera S'tuparo.

De Rabindranath Tagore.

Se vi volas aŭdi pri tempoj pasintaj sidigu tie ĉi sur tiu mia ŝtupo kaj aŭskultu la murmuradon kaj plendon donon de l' akvo.

Estis komence de septembro. La rivero estis alte ŝvelinta, nur kvar miaj ŝtupoj elrigardis el la akvo. Ĝiaj ondoj superverŝis la pli profundajn kuŝantajn partojn de la bordo, kie la kaĉu-plantoj en densaj masoj kreskis sub la branĉoj de mangoarboj. Ĉe unu flekso de la rivero elstaris ŝtonamasoj super la akva supraĵo. La fiŝistaj boatoj, alligitaj al trunkoj de akacioj ĉe la bordo, balancis frumatene sur la saĝajn portantajn ondoj. La longaj herboj sur la sablaĵo estis tuŝitaj de la leviginta suno; ili estis ankoraŭ plene disflorintaj, sed troviĝis nur la komenco de florado.

La malgrandaj boatoj plenblondaj siajn veletojn sur la rivero, ekradianta en la suna lumo. La Bramano, pastro venis kun siaj sanktaj vazoj por sin bani. La virinoj venis duopoj aŭ triopoj, por ĉerpi akvon. Mi sciis ke tio estis la tempo, kiam Kuzum venadis al la banŝtuparo.

Tamen en tiu mateno mi ŝin ne ekvidis. Bhuban kaj Svarno venis kaj plendis pro ŝi. Ili parolis pri tio ke oni ilian amikino forprenis en la domon de ŝia edzo, al ia loko malproksime de la rivero, kun fremdaj homoj kaj fremdaj domoj kaj fremdaj stratoj.

Kun la tempo paligis ŝia bildo preskaŭ tute en mia memoro. Jam forpasis. La virinoj sur la banŝtuparo parolis malofte pri Kuzum. Tamen iun matenon mi ektremis sur la delonge konata ektuŝo de ŝia piedoj. Ho jes, estis ŝiaj piedoj, sed ili estis nun sen bukoj kaj jam perdintaj sian antaŭan muzikon de movoj.

Kuzum fariĝis vidvino. La homoj diris, ke ŝia edzo estis laborinta en ia loko malproksime de ŝi kaj ke ŝi vidis lin nur kelke da fojoj. Letero alportis al ŝi la sciigon pri lia morto. Tiel ŝi, apenaŭ okjara, estis jam vidvino; ŝi forigis de ŝia frunto la ruĝan signon de l' edzeco, surmetis siajn ornamaĵojn kaj revenis en sian malnovan hejmon ĉe Ganges. Sed retrovis ankoraŭ nur kelkajn el siajn

estintaj amikinoj. Bhuban, Svarno kaj Amala edziniĝis kaj formigris; nur Sarat estis ankoraŭ tie ĉi, sed ankaŭ ŝi, kiel oni diris, devis edziniĝi en la venanta decembro.

Kiel Ganges, tuj kiam venas la tempo de pluvoj, rapide ekŝvelas ĝis sia tuta, grandioza pleneco, tiel ankaŭ disvolviĝis Kuzum de tago al tago ĝis la tuta pleneco de junulina belo. Tamen ŝia malhela vestaĵo, ŝia serioza vizaĝo kaj ŝia silenta konduto jetis vualon super ŝian Junecon kaj kasis ŝin al la homaj okuloj kiel malantaŭ nebulo. Dek jaroj pasis for, kaj neniu ŝajnis esti rimarkinta, ke Kuzum fariĝis matura virino.

Antaŭ multaj jaroj, en septembra mateno kiel hodiaŭ, venis granda, gracia juna sanjazin (Pastro-sanktulo, vivanta en ĉasteco) de hela haŭtkoloro en sia migrado tien ĉi kaj trovis rifuĝon en la templo de Ŝiva kontraŭe de mi. La famo pri lia alveno disvastiĝis en la vilaĝo. La virinoj lasis siajn kruĉojn ĉe la bordo kaj premis sin en la templon, por al la sankta viro elmontri sian respekton.

La amaso kreskis kun ĉiu tago. La gloro de l' sanjazin disvastiĝis rapide inter la virinoj. Unufoje li legis al ili el la Bhaga vata-Purana, aliffoje klarigis al ili la Ĝita'n aŭ predikis en la templo pri ia sankta libro. Kelkaj serĉis konsilon ĉe li, kelkaj sorĉimeдон kaj kelkaj medikamenton.

Tiel pasis monatoj. En aprilo, en la tempo de l' suna mallumiĝo, venis grandegaj homamasoj tien ĉi, por bani sin en la sanktaj ondoj de Ganges.

Sub la akacioj estis aranĝita foiro. Multaj el la pilgrimantoj vizitis la saĵazin'on, kaj inter ili estis ankaŭ kelkaj virinoj el la vilaĝo, kie estis edziniĝinta Kuzum.

Estis iun matenon. La sanjazin sidis sur miaj ŝtupoj kaj parolis siajn preĝojn, kiam subite unu el la pilgrimantinoj puŝis sian najbarinon kaj diris: — He, vidu do! Estas ja la edzo de nia Kuzum! — La alia singarde per du fingroj disŝovis sian vualon kaj vokis: — Ho ĉielo, estas li efektive! Estas la plej juna filo el la familio Ĉattergu el la vilaĝo! — Kaj tria, kiu ne tiel konsciecigis zorgis pri sia vualado, vokis: — Jes, nepre estas li! Li havas precize tiun saman frunton kaj nazon kaj okulojn! — Sed iu alia virino diris kun ekspropiro, enmetante sian kruĉon

en la akvon kaj ne rigardante plu al la sanjazin: — Ho ne! La juna viro jam ne vivas; li jam ne revenos. Kompatinda Kuzum!

— Li ne havis ankaŭ tiel grandan barbon, — rimarkigis alia. — Kaj tiel malgrasa li ankaŭ ne estis. — Kaj ankaŭ ne tiel granda, — opiniis ankoraŭ aliaj. Per tio la afero estis elĉerpita kaj oni ne parolis plu pri ĝi.

Iun vesperon, kiam leviĝis la plenumo, venis Kuzum kaj sidigis sur mia plej malsupra ŝtupo tuj super la akvo kaj ŝia ombro falis sur min.

Estis krom ŝi neniu ĉe la banejo. La cikadoj ĉirpis ĉirkaŭe de mi. La sonorado de l' templosonoriloj ĉesis, la lasta vibranta tono forsonadis malrapide, ĝis ĝi fine perdiĝis en la krepuskiĝanta arbareto sur la alia bordo. Sur la malhela akvo de Ganges kuŝis strio da brilanta luna lumo. Ĉe la bordo de la rivero, en la densejoj kaj arbustoj, sub la templa portalo, en la ruinoj de disfalintaj domoj, ĉe la rando de la lago, en la palma bosko, ĉie leviĝis ombroj de fantazia formo. La vespertoj pendis ĉe la branĉoj de ĉatin-arboj kaj balanciĝis mallaŭte tien kaj reen. En la proksimo leviĝis la laŭta hurlado de ŝakaloj kaj silentiĝis denove.

(Daŭrigota).

Kroniko.

Melburno, V.—Ĉe the Teachers' Training College, Carlton, kie la estontaj instruistoj de la ŝtataj Lernejoj de Viktorio studas la instruarton, pli ol 200 studentoj aŭskultis prelegon pri Esperanto. S-ro G. Wallace donis mallongan skizon de la disvastigo de Esperanto kaj montris kiel utila estus la alprenon de universala helpa lingvo. S-roj R. Jones, W. J. Drummond, kaj Skurrie donis modelan lecionon. S-roj Pyke kaj Rawson parolis pri sia vojaĝo en Eŭropo kaj montris lumbildojn de la lokoj vizititaj. Iuj el la aŭdantaro jam komencis la studon de la lingvo.

Post nelonge Esperantaj kursoj funkcios ĉiujespere en Melburno. Grandaj grupoj nun kunvenadas merkrede kaj vendrede, kaj, se la nunaj klopodoj bone iros, klasoj estos aranĝitaj por la ceteraj semajnaj noktoj, ĉe la negoca adreso de s-ro Rawson, vic-delegito de U.E.A., ĉe 212 strato Swanston.

Essendon, V.—S-ro Rawson instruas novan grupon.

Northcote, V.—Kurso sub la gvidado de s-ro Pyke komenciĝis antaŭnelonge.

Sandringham, V.—La ĉi tiea filio de la Australian Natives' Association, (Asocio de Aŭstralianoj), petis ke oni aranĝu Esperantan kurson por la lokaj membroj.

Wellington, Nov-Zelando.—Antaŭ la Cercle Litteraire Francais, s-ro W. L. Edmanson, D.B.E.A., faris komparon inter la lingvoj Franca, Angla kaj Esperanta. Sur nigra tabulo li klarigis la vortkonstruon kaj la elementojn de la lingvo. Finante li deklamis Esperante la bone konatan pecon el Shakespeare—La sep aĝoj de la homo.

Subteno por U.E.A.

La komitato elektita por aranĝi monkollekton por la U.E.A. energie laboras. Ili luis grandan koncertan salanon, Queen's Hall, sur Strato Collins, kaj prezentos koncerton per la helpo de altgradaj profesiaj muzikistoj sabaton la unuan de julio. Pli malfrue, alia koncerto, en Esperanto por Esperantistoj de Esperantistoj, havos lokon mezze de aŭgusto, ĉe koncerta salono, Hardware Club Chambers. Ĉiu Esperantisto estas petata ĉe esti kaj, se eble, alimaniere helpi.

La delegito en Barraba, s-ro Pryke sendis mondonacon. La Perth'a delegito, s-ro Caine, promesis, se eble, fari lokan kolekton. Delegitoj en la aliaj regionoj ne ankoraŭ respondis al komunikadoj.

Akademio.

Pro troa laborado, kiel redaktoro de grava gazeto pri senfadena telegrafio, kaj ankaŭ tre senkuraĝigita de la reformemo ĉe kelkaj, kiuj sur ŝancebla fundamento, malebligis ĉian firman konstruaĵon, D-ro Pierre

Corret rezignis en la Akademio la direktorecon de la Sekcio por la scienco kaj teknika vortaro.

Ne forgesante la servojn de D-ro Corret kaj dankante lin, la Akademio decidis unuvoĉe komisi al S-ro Rollet de l'Isle, kiu akceptis, la taskon organizi kaj direkti, sub ĝia kontrolo, la laborojn de la suprecitita Sekcio.

Kiel sekretario S-ro Rollet de l'Isle elektis S-ron C. Rosseau, aktoron de la "Poliglota Vade-Mecum de Internacia Farmacio."

TH. CART, Prezidanto.

Januaro 1922.

Nia Propagandisto en Eŭropo.

Under this heading the February "Suda Kruco" contained an account of s-ro P. T. B. Hudson's experiences in Spain. He wrote while voyaging to Greece. Another letter has been received detailing his somewhat extensive travels through the Holy Land. Space is not available here for the whole of his interesting letter, but it is certainly to be hoped that at the conclusion of his travels he may be induced to publish an account of them, for he is a careful observer, and has the art of graphically describing what he has seen. From Greece he went to Palestine, and after leaving Haifa, proceeded to Damascus. En route the Jordan was crossed, and part of the journey was along the coast of the Sea of Tiberias and over the mountains of Lebanon. He passed through Syria, and took ship at Beirut, calling at Tripolitza, Alexandretta, Cyprus, Rhodes, Smyrna, finally entering the Dardanelles and spending some days in Constantinople. His descriptions of all these places are most interesting. [He was invited to the Constantinople Esperanto group, where he met Dr. Stamatiades, the President, and ten other members, five of whom are doctors. The club has 160 members, and publishes a good local journal

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

(Bizancio). He acceded to a request to write an article for the latter. Helped by Dr. Kairis, an Esperantist, he obtained in a few minutes and with no trouble a visa to go through the new part of Greece on his way to Bulgaria. Another Esperantist, S-ro Zielniski, accompanied him through Stamboul.

The Esperantists were extremely helpful to him throughout his stay in Constantinople, accompanying him by day and entertaining him in the evening. On the 16th March he left for Bulgaria. In the train he met a blind Esperantist, with whom he had a long conversation. He learned where to find the Esperantists in Sofia. On arriving there, he writes: "I met the blind Esperantist again by appointment, and he introduced me to several other Esperantists, who gave me a hearty welcome. S-ro Kolef immediately set to work to show me around Sofia, which I find is a modern town with wide clean streets and some very fine buildings. In the evening I was taken to the Esperanto group, which left their rooms to go to a cafe to celebrate my arrival. We had a most pleasant evening. Everything is very cheap here. Living at the best hotel costs 7/6 a day. At Constantinople the hotel bill was 25/- a day. I am going to stay ten days in Sofia. The Esperantists are making me very welcome. Not long ago we were at war with Bulgaria."

S-ro Hudson intends to remain in Europe some months longer, and to take part in the coming Congress in Finland.

Avizo al Alilanduloj.

Lastatempe multaj personoj skribis el la eksterlando petante specimenan ekzempleron de la "Suda Kruco." Pro la alta kosto de papero kaj kompostado ni de nun devas postuli pagon por specimenoj. Do, ĉiu, kiu volas specimenon de la "Suda Kruco" sendu kun sia peto du respond-kuponojn. Alilandaj filatelistoj ofte sendas reklamanoncon sed plejparte ili forgasas aldoni la pagon. Tri linia anonco, (maksimume 24 vortoj), kostas unu ŝilingon, aŭ kvin respond-kuponojn. Ni neniam donas senpagan reklamon.

Esperanto kaj Entomologio.

La fakto, ke Franca entomologisto esperantista interŝanĝadas specimenojn kaj notojn kun Aŭstralia entomologisto neesperantista montras, ke Esperanto estas utila kiel internacia helpa lingvo kaj vekas la helpemajn sentojn de siaj adeptoj. S-ro Marshall Cohen, kiu agas kiel peranto, diras, ke li trovas la tradukadon tre interesa. Espereble lia sindona helpo allogos lian entomologian neesperantistan amikon en nian tendaron.

Esperantista Centra Oficejo.

La oficistaro de la Esp. Centra Oficejo konsistas nun el la solaj jenaj personoj, kiuj dediĉas tempon al la Oficejo, ekstere de siaj profesiaj okupoj:

S-roj Gabriel Chavet, ĝenerala sekretario de la K. K. K.; Barono F. de Menil, ĉefadministranto, kaj Leono Agourtine (ĝenerala propagando); F-inoj G. Gerard kaj Ch. Gaillot (administrataj laboroj).

Por faciligi kaj rapidigi la laboron, oni bonvolu adresi ĉiujn sendaĵojn laŭ la jena maniero: "Esperantista Centra Oficejo, 51, Rue de Clichy, Paris-9e."

La mensekzemplerojn oni adresos al la persona nomo de S-ro F. de Menil, aŭ al lia poŝta ĉekkonto:

Paris 1er Arrondissement C. C. 8-60.

BOOKS! BOOKS!

REDUCED PRICES FOR
ONE MONTH.

Lilio, 2/6, post free.
Passing of Babel, 7d. post free.
Lingvaj Respondoj, 1/3, post free.

LIBRARIAN,

AUS. ESP. ASSOCIATION,
BOX 731,
ELIZABETH-ST. P.O., MELB.

Recenzo.

Rakontoj el la Biblio, laŭ la traduko de Doktoro Zamenhof. Brita Esperantista Asocio, 17 Hart Street, London. Okdek paĝoj. Prezo aŭfrankite 1s 4p aŭ 7 respondkuponoj.

Dum la jaro 1921 la **British Esperantist** presigis kelkajn ĉapitrojn de la longe atenditan tradukon de la Biblio, kiun faris nia Majstro nelonge antaŭ sia morto. Traduko de Doktoro Zamenhof ĉiam estas grava okazintaĵo por la Esperantistaro. Nuntempe, kiam tre malmulte da liaj tradukoj restas nepresigitaj, ĉi tiu elĉerpajo el la "Libro de Libroj" estas duoble bonvena. La enhavo estas "La Falo de Jeriĥo," "Rut," "Rakontoj pri Ŝimŝon," "Samuel kaj Saul," "David kaj Goljat," "David kaj Bat-Seba," "Abŝalom," "Elia," "Jona." La antaŭparolo diras, ke "laŭ deziro de multaj legantoj . . . ili (la Rakontoj) nun estas prezentataj en formo de libro. Por ke la traduko de la Malnova Testamento estu plej zorge revizita, la Biblia Komitato devas labori dum sufiĉe longa tempo, kaj oni esperas ke ĉi tiuj rakontoj intertempe instigos eĉ pli fortan deziron por la tuta volumo."

La nuna libreto certe akriĝos tiun deziron.

Unua Kursa Legolibro, kompilita de W. M. Page, F.B.E.A. Eldonita de Brita Esperantista Asocio. Dudek kvar paĝoj. Prezo 10 pencoj aŭ 4 respondkuponoj.

Kolekto de anekdotoj kaj humoraĵoj ĉerpitaj precipe el **British Esperantist** kaj **Esperanto Monthly** aranĝitaj laŭ gradoj de malfacileco responde al la Ekzercaro. Ĉi tiu libreto bone taŭgos kiel facila legolibro por uzo kune kun la unua lernolibro.

C.W.B.

Al Niaj Subtenantoj.

Ni ricevis la jenajn sumojn, kiuj danko:—

J. Majstrovich, 4/6; T. M. Petrievich, 4/6; W. A. Collier, 5/-; E. Fowshaw, 10/-; G. D. Kvarestrom, 10/-; E. A. Turner, 4/-; I. F. Stande, 4/6; G. E. Jones, 3/9; A. Madarasz, 4/6; N. Jeffery, 4/6; C. Kueper, 1/-; M. Fowler, 1/6; J. Purn, 1/8; M. Trundle, 5/-; F. McArdle, 4/6; J. Paul, 10/-; L. M. Irwin, 5/-; V. Irwin, 5/-; H. Muller, 10/-; W. Marshall, 4/6; F. Halliday, 10/-; F. Koeppen, 4/6; W. J. Horsemann, 10/-; C. H. Kamp, 10/-; W. H. Williams, 4/6.

S-ro George Gordon, tuj viziton en Eŭropon, sciigas siajn korespondantojn, ke lia adreso estos c.o. Union Bank of Australia, 71 Cornhill, London, E.C. 3.

ESPERANTO BOOKS.

Books that every Esperantist should have:

Vivo de Zamenhof—cloth, 6/6 post free; paper, 3/7, post free.

Fundamenta Krestomatio, 6/6 post free.

International Language: Past, Present, Future, 2/7, post free.

Esperanto-English Dictionary, Melledge, 8/7, post free.

Beginners try

Esperanta Legolibro de Setala, 2/7 post free.

All progressive literature is obtainable from

PYKE'S BOOKSHOP,

212 SWANSTON ST., MELBOURNE

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

Free to You.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association
Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by
Fraser & Morphet, Printers, Eastbourne Street, Windsor.